# *Kubo kondamnas israelan masakron en palestina rifu?ejo*

*Image not found or type unknown*



**Nova masakro de la palestina popolo. Bildo: XBrunoRguezP**

Havano, sep 10 (RHK) La Ministro pri Eksteraj Aferoj de Kubo, Bruno Rodríguez, hodia? esprimis la kondamnon de sia lando kontra? la israela masakro en la palestina rifu?inta tendaro de Khan Yunis, en la sudo de la Gaza Zono.

En la misilatakoj kontra? la tendaro, 40 homoj estis mortigitaj, plejparte virinoj kaj infanoj.

Per la socia reto X, la plej alta reprezentanto de la diplomatio de la kariba nacio asertis, ke tiuj agoj pruvas israelan malrespekton al Internacia Humanitara Juro kaj la genocidon, kiun ili faras kontra? la

popolo de Palestino.

La? la Gaza Civila Defendo, ?i tio estas "unu el la plej teruraj masakroj ekde la komenco de la israela agreso en la Sektoro, ekzistas tutaj familioj kiuj malaperis en la sablo pro la misiloj."

Pli ol 41 000 palestinanoj estis mortigitaj kaj 94 925 vunditaj en israelaj atakoj kontra? Gazao ekde la 7-a de oktobro de la pasinta jaro, lastatempe raportis la Sanministerio de la teritorio en deklaro.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/364824-kubo-kondamnas-israelan-masakron-en-palestina-rifugejo

Radio Habana Cuba